

la
verda
stelo



ESPERANTO
NEDERLAND

SEKCIO GRONINGEN-DRENTE
&
FRISA ESPERANTISTA RONDO

septembro 2007



LA VERDA STELO

eldono de

ESPERANTO NOORD-NEDERLAND

ESPERANTO-KLUBO GRONINGEN-DRENTE

prezidanto

s-ro J.B. Swenker

T.W.S. Mansholtstraat 25

9728 MC Groningen

tel. +3150 527 45 72

retadreso:

prezidanto.groningen@esperanto.hobby.nl

sekretario

s-ino W. van Ganswijk-Vlasblom

Huygensstraat 27

9727 JA Groningen

tel. +3150 525 00 86

retadreso: wvganswk@xs4all.nl

kasisto

s-ro L. Staghouwer

Julianalaan 25

9781 ED Bedum

tel. +3150 301 40 15

retadreso: luitstaghouwer@home.nl

FRISA ESPERANTISTA RONDO

s-ro W. Akkerman

Westerein 14 a

8571 GB Harich (Frl)

tel. +3151 460 22 72

retadreso: wiebrenakkerman@hetnet.nl

ttt-ejo

<http://pingveno.nl/klubo>

kunvenejo

Dreesflat, W. Dreesstraat 1

ĉiun alternan ĵaŭdon ni kunvenas

de la 19h45 ĝis la 21h45

Esperanto-centro

T.W.S. Mansholtstraat 25

9728 MC Groningen

J.B. Swenker, tel. +3150 527 45 72

redakcio

Koos Scharroo

Wil van Ganswijk-Vlasblom

retpoŝto: laverdastelo@pingveno.nl



Enhavo

3 ... UK en Roterdamo – peto pri helpo

4 ... Forpaso

5 ... Klubkunveno, naskiĝtagoj

6 ... Kio pri la nordo?

9 ... Traduko de OpenOffice.org

11 ... Jubileo Esperanto Noord-Nederland

Contributie Esperanto Noord-Nederland 2007

| | |
|---|---------|
| Afdelingslid (incl. abonnement LA VERDA STELO) | € 12,50 |
| Gezinslid | € 6,25 |
| Donateur (minimaal) | € 7,00 |
| Abonnement LA VERDA STELO | € 7,00 |

Over te maken op Postbanknr. **3822472** t.n.v.

ESPERANTO NOORD-NEDERLAND te Bedum

Leden van Esperanto Noord-Nederland worden geacht lid te zijn van **ESPERANTO NEDERLAND**

Vandaar dat wij hier ook het gironummer ervan vermelden:

Postbanknr. **375522** t.n.v. **ESPERANTO NEDERLAND** te Heerhugowaard

| | |
|--|---------|
| Lidmaatschap (incl. abonnement FEN-X) | € 27,50 |
| Gezinslid | € 8,00 |

Universala Kongreso 2008 en Roterdamo



Karaj gesinjoroj,

Kiel vi verŝajne jam scias, la Universala Kongreso de Esperanto okazos venontjare en Roterdamo, do en nia lando. Ĝin organizos UEA mem, ĉar tiu asocio estos tiam centjara jubileanto!

Sed tiu organizo kompreneble ne povas plenumi ĉiun laboron mem. Venos minimume 2000 esperantistoj, eble eĉ 3000, do la taskoj estos multegaj. Tial UEA petis kelkajn nederlandajn personojn esti en Loka Kongresa Komitato (LKK) por organizi la helpadon. La LKK konsistas el: Ans Bakker (prezidanto), Ineke Emmelkamp (sekretario) Loes Demmendaal, Joke Hoobroeckx, Bert de Wit, Marijke Lathouwers kaj, nome de la Centra Oficejo de UEA, Osmo Buller kaj Clay Magalhães.

La Kongreso okazos *de la 19-a ĝis la 26-a de julio 2008*.

Ni kompilis liston de esperantistoj al ni konataj, al kiuj ni volas sendi peton helpi. Mi kolektos la respondojn kaj mi esperas, ke multaj el vi konsentos!

La taskoj estos jenaj:

- disdoni kongresajn paperojn en la t.n. giĉetoj dum la unua tago
- informejo
- rendevua tabulo
- gvidi ekskursojn
- montri en flughavenoj *Schiphol* kaj *Zestienhoven* la vojon al la publika transporto
- en centra stacidomo montri la vojon al tramoj ktp.
- asisti en la libroservo.

Aliaj taskoj ekzistas, sed la nomitaj estas la plej gravaj.

La Kongreso ne povas okazi sen helpantoj, kies laboro estos la 'oleo' de la tuto.

Nia demando al vi ĉiuj do estas: *ĉu vi volas plenumi unu (aŭ pli) el la taskoj?*

Se vi volas, bonvolu sendi al mi mesaĝon kun via(j) prefera(j) tasko(j).

Fine de septembro okazos la sekva kunveno de LKK, kaj de tiam mi havos pli da informoj pri la enhavo de la taskoj. Se vi konas aliajn esperantistojn, kiuj ne ricevis ĉi tiun peton, bonvolu transdoni la peton al ili.

Korajn salutojn de

Marijke Lathouwers
Kruiszwijn 1205
1788 LE Den Helder
Tel. 0223-643781

Forpaso



† Houkje Boersma-Hoekema

La 27-an de julio 2007 en la aĝo de 88 jaroj subite forpasis

Houkje Boersma,

vidvino de Tsjerk Boersma.

Dum la lastaj jaroj ŝi suferis okulmalsanon kaj aliajn malsanojn, kiuj ofte akompanas homojn en tre alta aĝo. Sinjorino Boersma, kiel ni ŝin nomis, vizitis dum multaj jaroj la Frisan Esperantistan Rondon kaj multe laboris por Esperanto per helpo en la iama libroservo de Esperanto Nederland (antaŭe L.E.E.N.)

Dum la loĝado en De Hoeve la domo de fam. Boersma gastame akceptis multajn E-amikojn. Persone, mi spertis multan helpon en la gvidado de la frisa klubo. Nelacige s-ino Boersma helpis sian edzon kaj ofte prelegis por la kamparanaj virinoj. Ni multfoje diskutegis dum multaj horoj kiel prezenti Esperanton al la publiko.

Multajn kongresojn ŝi vizitis kun la edzo, kiu multjare estis komitatano kaj volontulis en la UEA-oficejo en Roterdamo.

Dum la adiaŭa soleno en Reduzum ni superrigardis ŝian vivon kaj aŭdis i.a. muzikon de frisaj kantoj, per kio ni memoris ŝian amon por Fryslân. Fine ni kantis nian himnon *La Espero*.

Nome de Frisa Esperantista Rondo kaj Esperanto Noord-Nederland s-ro Wiebren Akkerman parolis kaj dankesprimis nome de la tuta Esperanto-movado.

Nur rekte, kuraĝe kaj ne flankiĝante, ni iru la vojon celitan. S-ino Boersma donis al ni la ekzemplon.

Ni memoras ŝin respektplene.

Wiebren Akkerman

Klubkunvenoj

septembro

20 pri Komoroj – *Joeri Smolders* (gastpreleganto)

oktobro

4 malferma vespero – por ĉiuj, kiuj interesiĝas pri Esperanto

18 instrumaterialoj (CD, DVD, video)

novembro

1 judoj en Nederlando

15 pri Tajvano – *Anneke Schouten* (gastpreleganto)

29 falsaj amikoj

decembro

13 festvespero

- ŝanĝoj rezervitaj -

la plej freŝajn novaĵojn kaj ŝanĝojn vi trovos en nia retejo sub la rubriko **Aktuale**.

<http://pingveno.nl/klubo>

Naskiĝtagoj

septembro

3 W. Akkerman

17 H.W.T. van Hogen-Cornelissen

24 A.E. vd Heij-Alblas

26 G.M. van Reenen

30 A.H. Thomas-Nitzsche

oktobro

3 D. van der Heijden

15 Ch.T. Behr-Kunst

29 A.M.H. Dodebier

novembro

10 E.L. van der Roest

Gratulon!

decembro

15 H. Molthoop kaj
P. Reddingius-van Houtum

21 H. Leeuwerke-Kiers

30 R.J. Hettinga

31 A. van der Heij

Kio pri la nordo?

19 aprilo 2007

Ni invitos *Joeri Smolders* prelegi pri *Komoroj*. Tiu lando konsistas el tri insuloj, kiuj situas en la *Hindia Oceano*, inter la afrika kontinento kaj la nordo de Madagaskaro. Joeri havas tie amikojn, kaj li povos montri bildojn pri tiu fora insularo. Ni invitos ankaŭ *Anneke Schouten*, kiu estis duafoje en Tajvano.

Rob Moerbeek vizitis familion Swenker por rigardi la stokon de haveblaj libroj. Rob elektis plurajn titolojn por la biblioteko en Roterdamo. Ĉar li vojaĝas trajne, li povis kunporti nur limigitan nombron da libroj.

Nia nova membro *Gonda* korespondas kun amikinoj en Rusio kaj Germanio. Luit sendis leterojn kaj retmesaĝojn al kelkaj el siaj korespondamikoj kaj ankaŭ ricevis kelkajn leterojn kaj retmesaĝojn.

Unu el la novaj kursanoj de Koos, mezlerneja instruisto, jam finstudis la retan kurson. Invitita por intervjuo en la lernejo, Koos proponis al li daŭrigi la studadon per *Zondervan kaj Manders*.

La prelego de *Wim Rijnders* temas ne ĝenerale pri dancoj, sed pri la *Flamenko*, la danco kiun Wim tre ŝatas. Ĝi devenas de *Andaluzio*, suda regiono de Hispanio. Oni opinias la muzikstilon Flamenko la muziko de la ciganoj. Fakte, la ciganoj (kiuj originas de Hindio) asertas, ke Flamenkon ili inventis, sed ili ne vere pravas. Flamenko estas muzikstilo ne vere eŭropa, sed havas ankaŭ ekster-eŭropajn influojn (i.a. de judoj kaj afrikaj sklavoj). La flamenka muzikstilo originas de Rusio. Kanto, gitarludo, danco, man- kaj piedfrapado

kaj ritmo estas gravaj elementoj de Flamenko. Sed la gitarludo estis ne ĉiam parto de tiu muzikstilo, ĝi aldoniĝis nur dum la disvolviĝo.

Oni ne ĉie ludas la Flamenkon en sama maniero. En pluraj urboj la Flamenko disvolviĝis iom malsame. Wim volonte akceptis la sugeston de Wil, kiu opinias, ke la Flamenko havas plurajn *dialektojn*.

Wim montris bildojn pri la dancoprezentado de 2006 en la *Prinsentheater* en Groningen. En la sama teatro okazos prezentadon ankaŭ ĉi tiun jaron: la 16-an kaj la 17-an de junio.



Wim Rijnders

La Flamenko estas danco *brua*, ne nur pro la manfrapado, sed precipe pro la sonoj, kiujn oni aŭdigas per la ŝuoj. Sub la kalkanumo kaj la pinto de Flamenko-ŝuoj estas najloj, por ke la piedfrapado sonu laŭte. Wim montris paron de tiaj ŝuoj.

Ĉar sur la planko de nia kunvenejo estas tapiŝo, la piedfrapadon ŝajne ne eblas aŭdigi. Sed renversante tablon, ni solvis tiun problemon, kaj Wim entuziasme aŭdigis iom de la flamenko

piedfrapado, dancante sur la malsupra flanko de la tabloplataĵo.

Unu el la plej gravaj elementoj de la Flamenko estas ritmo, kiu plejofte ne estas en mezuro kvartempa, sed ekzemple 12-tempa:

1, 2, 3 – 1, 2, 3 – 1, 2 – 1, 2 – 1, 2.

Ni kune klopodis man- kaj piedfrapi en tiu ritmo. Por la plej rapida manfrapado oni bezonas du parojn da manoj, kiujn oni frapas alterne. En Hispanio oni kutime kuraĝigas la dancantojn. La plej konata kuraĝigo estas *olé!*

Wim aŭdigis kelkajn specojn de Flamenko-muziko, en kiu estas diversaj niveloj:

- *Chico*-Flamenko (ĉiko):
gaja, festa Flamenko-muziko;
- *Medio*-Flamenko:
malpli gaja ol Chico;
- *Hondo*-Flamenko, la plej grava stilo:
tre serioza, malrapida kaj iomete malgaja. Precipe en ĉi tiu muzikstilo aŭdeblas la araba influo.

Li finis sian prezentadon dancante, kaj la ĉeestantoj akompanis per fervora manfrapado.



manfrapado

3 majo 2007

Johan ricevis funebran leteron pri sinjoro *den Toonder* el Terneuzen, ricevanto de La Verda Stelo. Wil sendis al

la edzino kondolencan karton.

Pretos deĵori la 5-an de majo en la *Urba Parko* krom Johan, ankaŭ Luit kaj Ineke, dum aliaj intencas la festivalon viziti.

Wil ŝatas havi por tiaj okazoj novajn varbilojn kun informoj temantaj ne nur pri Esperanto mem, sed ankaŭ pli specife pri la Groningen-a klubo, rilate al la venontjara *Universala Kongreso* en Roterdamo. Ŝi ankaŭ konsilis fari slipojn por disdoni kun la printita retadreso de la interreta Esperanto-kurso je *pingveno.nl*.

Ni decidis kune manĝi la 31-an de majo en la jam sufiĉe konata ĉi-kvartala picejo *// Lago*.

Post pluraj jaroj Esperanto Nederland havos novan prezidantaron, ĉar tiucele sin anoncis *Ans Bakker-Ten Hagen*.



Ans Bakker-ten Hagen

Sabaton, la 13-an de oktobro, okazos internaciaj ekzamenoj en Internacia Esperanto-Instituto en Hago.

Kontaktiĝis kun Wil *Elke van Gompel*, kiu siatempe trastudis la interretan kurson en unu semajno, kaj kies frato tradukis ĝin en la anglan lingvon. Ŝi nuntempe studas por fariĝi instruistino. Dum iu staĝo ŝi instruis al la lernantoj

kanton en Esperanto, kaj ties tekston ŝi sendis al Wil. Estas agrable aŭdi pri ekskursanoj, ke ili ankoraŭ ĉiam entuziasmas pri la lingvo.

Luit ricevis el Ĉinio novan *Mikrofone*, kiu antaŭe aperis kiel apartaj folioj, sed nun denove estas belaspekta maldika revuo. Li ankoraŭ ne finlegis ĝin, ĉar ankaŭ la fotado postulas multan tempon.

Pro la bela vetero de antaŭ kelkaj tagoj Koos kaj Frans ekhavis la ideon, armitaj kun mapo, distribui la klubajn informilojn en la urbon bicikle, kio laŭ onidiroj estas kvazaŭ premi la spurojn de karmemora *Niza Kuiterman*.

Bert Begeman preparis kvizon pri lingvoj en formo de mezlerneja ekzameno. La unua tasko estis diveni lingvojn el

multaj mallongaj diverslingvaj tekstoj. En pluraj landoj estas parolataj pli ol unu lingvo, sed kiom? La respondoj estas surprizaj. Ĉu vi sciis, ke en Francio la nombro estas *ok*?

Ankaŭ la origino de vortoj estas interesa. Kial do afrikansaj vortoj tiel ofte sonas komike en niaj oreloj? Komike estas ankaŭ, ke unu litero el la georgia lingvo similas glaciaĵon-kun-kremo!

La kvizon gajnis Ineke Emmelkamp, kvazaŭ havante antaŭscion, ĉar ŝi laboris dum multaj jaroj ĉe la fremdula kontrolservo kaj do scias multon pri fremdaj lingvoj profesie. Ni opiniis tamen, ke la ĉokoladbriketo, kiun Bert aljuĝis, estu premio konsola por tiu, kiu proprigis al si la malplej multajn poentojn. Jen la pruvo, ke ankaŭ malmulton scii fojfoje profitas...



Traduko de OpenOffice.org

Jam en 2001 esperantistoj faris la unuajn iniciatojn, kaj pli ol jaron teamo de volontuloj laboris por esperantigi la ampleksan liberan programaron kun la nomo OpenOffice.org. Aŭtune de la jaro 2004 la laboro ricevis oficialan rekonon de la internacia teamo de OpenOffice.org, kaj en la oficiala paĝaro de la organizaĵo aperis ankaŭ sekcio pri la esperantiga projekto. Tamen ĝis nun la traduklaboro ne estas finita. Por korekti la situacion, en Kembriĝo, Anglio, nun okazis la unua ĉeesta kunveno de la tradukteamo.



Post pluraj jaroj de perreta kunlaboro, membroj de la esperantiga skipo de OpenOffice.org havis sian unuan 'veran' renkontiĝon en pasinta julia semajnfino, en la hejmo de la brita esperantisto kaj projektogvidanto *Tim Morley*, en Kembriĝo, Anglio. Kvar membroj ĉeestis - *Yves Nevelsteen*, *Joop Eggen*, *Vilĉjo Walker* kaj *Tim Morley* – kaj sabate vizitis ankaŭ *Edmund Grimley Evans*.

De la 5-a ĝis la 8-a de julio, tiuj aktivaĵoj diskutis pri 'dubindaj' tradukoj kaj malfacilaj terminoj de la programaro, kiel *dummy text* (lokokupa teksto), *wizard* (asistanto) kaj *to blink* (pulsi). Konsilis de distanco, per labordosiero en *Google Docs* kaj per telefono, *Bertilo Wennergren* de la Akademio.

De longa tempo, la laboro estas agnoskata kiel oficiala projekto de OpenOffice.org ĉe ties retejo. Tuj antaŭ la renkontiĝo, programisto ĉe OpenOffice.org disponigis fruan testversion de la programo, kiun la tradukskipo en Kembriĝo pridiskutis. Pro

diversaj problemoj, ĉefe teknikaj, la esperantigo de tiu unua versio estis sufiĉe aĉ-aspekta, kun ankoraŭ multe da anglaĵoj, kiuj devintus aperi esperante. (Bedaŭrinde, tiu versio jam estas distribuata kun *Ubuntu Linukso*).



la Esperantiga skipo

Unu tre plaĉa rezulto de la semajnfino, tamen, estas ke tre baldaŭ aperos nova testversio, kiu devus esti multe pli bona. La skipo bonvenigas volontulojn, kiuj pretas kunlabori por kontroli, provlegi kaj poluri la baldaŭajn, pli firmajn test-versiojn; bonvolu kontakti la tradukskipon per mesaĝo al

timsk@openoffice.org, aŭ vidu la projektan retejon <http://eo.openoffice.org>

Dumtempe, testversioj ankoraŭ ne enhavas ĉapelitajn literojn, ĉefe ĉar ne ĉiuj iloj, kiujn uzas la skipo, bone traktas *unikodon*, sed jam estis verkita programeto (nomita *seniksigni*) por ĉie enmeti ĉapelitajn literojn en la programaron. La grupo senpacience atendas la momenton, kiam ili povos funkciigi la programon.

Restas la helptekstoj por traduki kaj necesas ankoraŭ aldoni aliajn kromaĵojn kiel defaŭltan literum-kontrolilon por Esperanto kaj funkcion por povi tajpi Esperantajn literojn sendepende de ajna alia programo aŭ komputila agordo.

La tradukskipo inter si kaj kun diversaj fakuloj multe diskutis kaj plu diskutadas pri komputilaj terminoj kaj esprimoj. Por disponigi la konkludojn de tiuj ĉi diskutoj al ĉiuj esperantistoj, ekestis la projekto *Komputeko*.

OpenOffice.org estas komputila programaro, kiu funkcias simile al *Microsoft Office* (t.e. *Word*, *Excel*, *PowerPoint*, *Access* ktp.) sed estas libere uzebla kaj kopiebla de ĉiu. Ĝi estas ekzemplo de la t.n. *liberaj programoj*; tio signifas ne nur, ke iu ajn rajtas laŭleĝe disdoni kopiojn de la programoj, sed ankaŭ, ke iu ajn povas kontribui al la evoluo de la programaro.

fonto: *Libera Folio*

mondlinge cursus Esperanto

In september 2007 start weer een mondlinge cursus Esperanto. Deze wordt gehouden op de dinsdagavond van 20:00 tot 21:00 uur.

Inlichtingen en/of aanmelden:
Mevr. W van Ganswijk-Vlasblom
Huygensstraat 27
9727 JA Groningen
tel. +3150 525 00 86
e-mail: wvganswk@xs4all.nl



Jubileo Esperanto Noord-Nederland

kelkaj fotaj impresoj





12







14





ESPERANTO NOORD-NEDERLAND
T.W.S. Mansholtstraat 25
9728 MC GRONINGEN



ESPERANTO - taal zonder grenzen